

T. 492. 147

STANISŁAW WYSPIAŃSKI.

PROTESILAS

KAJ


LAODAMIA

TRAGEDIO.


VARSOVIO.

1908.

20-







ALDONO LITERATURA AL „POLA ESPERANTISTO“.

---

# PROTESILAS KAJ LAODAMIA

TRAGEDIO

DE  
STANISŁAW WYSPIAŃSKI.

El pola lingvo esperantigis  
Dro LEONO ZAMENHOF.

Biblioteka Narodowa  
Warszawa



30001005045424

VARSOVIO.  
PRESEJO DE L. BILIŃSKI KAJ W. MAŚLANKIEWICZ.  
1908.

## PERSONOJ:

LAODAMIA  
AOJDES  
MALJUNULO  
EKONOMINO  
SERVISTINO  
ĤORO

La agado estas en Phylace.

## DEKORACIO:

*Aleo kolonara; profunde, post la kolonaro oni vidas boskon de cipresoj; meze en ĝi blankan maŭzolean tombkolonon; la fonon formas mar-aj ŝtonegoj kaj ora ĉielo de l' okcidento.*

*El la dekstra kaj maldekstra flanko eliras ĥoro de knabinoj; ili iras post la kolonaron kaj stariĝas ambaŭflanke de la tombkolono.*

*Apogita per la brako ĉe la trunko kolona atendas Aojdes.*



T. 492. 147 (A)  
1952 K 241/50



## HORO

Ĝis kiam ni apud la tombo  
funebre staros,  
ni obeemaj servistinoj?  
La kordoloro de l' reĝino,  
ŝajnas, eterne daŭros jam.  
Jen el kuŝejo ŝin funebran  
kondukas korĉagrenoj,  
kiuj senfundan larmofonton  
gardas, vekante rememorojn.  
Kaj jen vivplena, ŝi floranta  
la vivon rompas memmortige  
per plor' senĉesa kaj ĉagrenoj.

## LAODAMIA

*(eliras el la kuŝejo, en vesto purpura, tola, senpere altuŝanta la korpon, simila al mallarĝa vesto supreniranta ĝis sub la brakoj, falanta ĝis al la piedoj kaj kuntirata dekstraflanke de l' supro ĝis la malsupro per dekdu agrafoj, meze kuntirita per la zono el gravuritaj arĝentaj ĉeneroj; la brusto kaj la ŝultroj kovritaj per du libere falantaj tolpecetoj (la koloro simila al "heavenos"), altranĉitaj en la formo de kvadratoj, kiuj antaŭe sur la brakoj estas kunfiksitaj per du grandaj pingloj; la haroj longaj, korvonigraj, krispaj, plektitaj en kvar harligoj gracie kunpinglitaj per orfolietoj kaj grandaj pingloj kaj per rubandoj ligitaj sur la posto de l' korpo; sur la brakoj — kelkaj braceletoj serpentformaj, spirale kuntiritaj; la piedoj estas en sandaloj, kies ĉirkaŭvolvantaĵoj atingas ĝis super la genuoj, sub la sandaloj altaj lignaj koturnoj).*

1. Por mi jam mortis la Feliĉo  
Por ĉiam, —  
ĝi super amo fermis pordon  
la bronzan.  
Amato mia, vi karesoj,  
al vi sopiras miaj manoj,  
al la miela via buŝo  
sopiras buŝ' brulanta mia.  
Ho, kial Orkus vin forrabis,  
larmege plendas mia koro,  
sopiro nutras malfeliĉan,  
animo mia vin alvokas —  
por mi, ve, estas vi perdita.
2. Por mi vi estis tago, flamo,  
mi estis roz' en brakoj viaj.  
Kial rapide tag' nubigas,  
kial jam ama flam' ne lumas?  
For rabas vin de mi ventego  
kaj roz' velkinta nun sekiĝas.  
Ho, kial Orkus vin forrabas,  
vundita plendas la animo,  
al vi dolore ĝi sopiras. —  
Por mi, ve, estas vi perdita.
3. Flamplenaj viaj ĉirkaŭprenoj  
en songoj tenas min revige,  
pasiaj briloj en okuloj  
al mi flamigas vangojn palajn.  
Revenu vi, ke por momento  
kun vi mi estu kunigita,  
revenu vi, ke por momento  
nun sola, larma sur kuŝejo  
mi reeksentu la dolĉegon



de mi kruele forrabitán.  
Ho, kial Orkus vin forrabas,  
ĉu min favoros pli la Dioj?  
Animon vian serĉas mia  
tra spac' infera de dezertoj.

4. Sed scias mi -- mia animo  
al lit' revenas nun malplena.  
La akvojn ja de Aĥerono  
ne vados mi kaj ne trairos.  
Ho, kial sort' min vundas tiel,  
larmegaj estas plendoj miaj;  
kun la sopir' edziniĝinte,  
mi scias: — estas vi perdita.

*(Ŝi haltas momenton apud la maŭzoleo kaj apogas la kapon ĉe la ĉarpentitaj ŝtonoj de l' tombokolono; tiel staras ŝi dum ia tempo senmove).*

#### ĤORO

1. Malĝoja estas nia sinjorino, malĝoja sen la edzo kaj sen karesoj kvietigantaj kordoloron, la karesoj de l' edzo kaj de l' amato.
2. Malĝoja estas via domo kun la konstruitaĵo duonfinita; ne estas kovritaj per ŝtala tegmento tiuj alkovoj, kie karesoj devis vin dorloti kaj kunligi per amĉenoj.

#### LAODAMIA

*(revenas en la ĉambrom trankvila).*

#### ĤORO

3. Ĉiutage vi forsendas la trompiĝintajn en siaj esperoj komercistojn; for vi resendas

per oro borderitajn tapiŝojn kaj per oro  
ĉirkaŭforgitajn kruĉojn por bonodoraĵoj  
kaj glatigitajn pladojn el verda ŝtono; —  
for naĝas la trezoroj ren sur nigraj  
boatoj, — —

kaj vi restas sola.

*(La knabinoj kuntiras la kurtenon kaj la  
ĉambro fermiĝas; oni vidas nur tralumetantan  
bluan tagon).*

4. El tiuj landoj transmaraj vi jam neniun  
povas atendi, —  
kaj malĝoja kaj sopiranta vi estas, kiel  
tiuj, kiuj atendas.

#### LAODAMIA

*(sidiĝas sur la kuŝejon).*

#### HORO

Larmoplena rigardo via vagas super la  
marmoraj plataĵoj de l' ĉambro, kiel ne-  
buliĝinta rigardo de tiuj, kiuj vidas mal-  
fortan rebrilon de l' espero.

5. Manoj viaj, sopirantaj al karesoj, solaj  
plektiĝas ĉirkaŭ la gracia kolo kaj alprem-  
as la flamantajn vangojn; kvazaŭ rozo  
estas via vizaĝo.

#### LAODAMIA

*(donas mane signon de senpacienco).*

#### HORO

*(eksilentas).*



*(El post la kurteno aperas la kapo de Aojdes. La knabino, kiu lin rimarkis, alpaŝas al Laodamia).*

### SERVISTINO

Jen, kiel ĉiutage, en la difinita horo, kiam falas krepusko... venas la kantisto.

Li alproksimiĝas trudema, haltante ĉe la unua sojlo.

Jen li glora per elokventeco rakontista, flamas de deziro kanti al vi la konatan rakonton pri via edzo,

kiel li estis heroa kaj kiel li pereis.

La kantisto aljetas ĉiutage novan strofon—kaj, ŝajnas, ke hodiaŭ ankaŭ li alportis la novajn.

### AOJDES

*(dume eniras).*

### SERVISTINO

Jen li jam staras ĉe mi servistino kaj vin per petegaj rigardas okuloj, ĉu nutraĵon vesperan al li vi permesos meriti.

Li estas preta paroli...

### LAODAMIA

*(ne rigardante Aojdes'on).*

Vi venas ĉiutage, —  
do kantu al mi rakonton longan, kiel ĉiutage vi faras,  
kiam kliniĝas la tago, —



kaj kun la sonoj de via parolo falas  
krepusko. —

Sed hodiaŭ alia en mi sonas kanto,  
ol ĉiutage. — — —

Parolu do.

*(Oni eksidas; la ĥoro sidiĝas per larĝa duon-  
rondo sur la tero; Aojdes meze sur aparta seĝo.  
Vizaĝo lia estas bronzkolora, sunbruligita; la  
barbo nigra, krispa kaj kojnforme tondita; en  
la haroj estas enplektita duonronde branĉeto  
de freŝa laŭro, de kiu sur la nukon falas pur-  
puraj rubandoj; mallonga vesteto bronzkolora  
kaj blanka mantelo ĉirkaŭligita per rimenoj  
kaj drapirita; en la mano kelkaj kunigitaj fajf-  
iloj; lia masko ridas per la rideto de Ajĝinetoj).*

#### LAODAMIA

*(aŭskultas rapide; jen ŝi leviĝas triumfante, —  
jen subite ŝi fariĝas malĝoja, malkvieta).*

#### AOJDES

1. Paris, la Priamido  
El la kastelo Argiva  
rabis for al Atrido  
Helenon, edzinon del' reĝo  
kaj en la muroj Iljonaj  
ŝin tenis, amon trudante.
2. Atrido plendis al frato  
al reĝo, la estr' en Mikenoj:  
„honto por ambaŭ ni estus  
ne venĝi la malhonoron;  
perfida fremda vagulo  
la gastajn leĝojn ofendis“.

3. Tuj oni ŝipojn la nigrajn  
naĝigis sur akvan lazuron:  
sub blankaj veloj boatoj  
la marajn ondojn disigas.

*(Sur la kurteno oni vidas naĝantajn ŝipojn).*

4. Krioj trafendas aeron  
kvazaŭ dum birda forflugo;  
bruege svarmas ŝiparo  
ĉe bordoj ĉirkaŭvagante.  
Aŭlido ilin katenas,  
ĝis ilin maro forportos.
5. En Delfoj estas en bosko  
Apolla templo profeta:  
Aĥajoj tie humile:  
aŭskultas la vortojn de l' dio:  
„Ruinoj atendas Ijonon,  
vin—gloro kaj laŭro senmorta;  
kiu unua el ŝipo  
per vigla atingos eksalto  
la glebon de la Dardanoj  
kaj sablon piede ektuŝos,  
..... mortfalo“.
6. „Li gloron plej grandan atingos  
per morto kaj tomb' akiritan“.

— — — — —  
Prolesilas ĝin aŭdas.

*(Aojdes konfuzita interrompas, ĉar dum la last-  
aj vortoj oni aŭdas Laodamian, kiu murmuret-  
as, kvazaŭ ŝi parolus kun iu, kiu staras apud ŝi).*

### LAODAMIA

Kvankam karesas vortoj viaj,  
vi ion kaŝas en la koro —



ridetas vi, sed jen subite  
la ridon vi haltigas.  
De l' viv' fadeno nur komencis  
sin disvolvi;  
ankoraŭ Kloto ne ekŝpinis  
unuan volvon.

### AOJDES

7. Protesilas ne rapidas  
plendojn aŭskulti edzinajn;  
la glor' al li bruston flamigas,  
pli forta ĝi estas ol amo,  
„Gloro min, gloro atendas,  
mi devas landon forlasi,  
vin - amatinon restigi —  
edzinon plej karan kaj ĉarman.  
Pereos mi la unua —  
min ne atendu“.

### LAODAMIA

Ho, cielruĝo,  
kiu subiris  
sur maran fundon,  
ne veku vin maltrankvile  
el brakoj de Maljunulo.  
Se vi sur ondoj  
ree bruligos  
fajrojn de ĉielruĝoj,  
— vi nian fruigos disigon.

— — — — —

### AOJDES

Li, sorton plendante,  
ĉe l' amatino nokton pasigis,



- revante pri gloro,  
senmortaj laŭroj,  
per sola lia braveco  
for al herooj rabitaj —  
antaŭ Aĥajoj multnombraj,  
portantaj ferajn armilojn.
9. Rapide nokto alkuris,  
venis la hor' de l' disiĝo.

### LAODAMIA

Vi, ĉielruĝo,  
jam kuras rapide,  
ne aŭdas vortojn vi miajn;  
vestita en flugemaj  
nebuloj multekoloraj  
vi kuras for  
averti Nokton nigran,  
ke Sun' leviĝis,  
ke el sub ondoj  
fortaj ĉevaloj jam trenas  
ĉaron orbrilan

— — — — —  
Febus, vi juna!  
vi nin junajn disigas.

### AOJDES

10. Jen lia ŝipo — unua  
alnaĝas al bord' malamika;  
sur sablon pont' estas ĵetita,  
Heroo al flug' sin preparas.  
Simila al aglo, li supren  
eklevis la lancon kaj ŝildon.—

Terura por la malamikoj  
li krias ardante per fajroj  
de Ares-de l' Dio batala.

11. Jam siblas ŝetiloj;  
lin kovras nebulo da ili. —  
Li falis. — Rapide mortinton  
forportas la estroj — amikoj.
12. Nigraj ŝipoj rapidas  
kaj sablojn surbordajn trafosas;  
kriegoj de korvaj aroj  
al Trojo pereon elgrakas.
13. Flanke de bordaj sabloj  
Estro — Atrido  
tombejon al vi konstruis  
kun bataliloj de Heros.
14. Per manoj de Nimfoj  
freŝe ŝiritaj de ulmoj—  
verdaj branĉetoj  
la tombon garde ornamas.  
Sed antaŭ ol urbon Tindaran,  
kreskante supren ekvidas,  
tuj velkas ili, sekiĝas,  
sed sube novaj radikoj  
freŝan akiras nutraĵon.
15. Jaroj flugas... kaj plendas  
kun juna koro knabino.

*(Ĉi tie Aojdes leviĝas de la seĝo kaj kliniĝas al Laodamia, murmuretas amindume siajn proprajn vortojn, kiujn li subaŭskultis antaŭe).*

#### AOJDES

„Vi flamajn konas ĉirkaŭpreojn,  
en sonĝoj ili vin revigas, —



ekkonu do okulajn brilojn,  
kiuj flamigas vangojn palajn.  
Restu kun mi, restu momenton:  
dolĉegon vi resentos...“

*(Li volas paroli plu; Laodamia interrompas lin per gesto — ŝi jam antaŭe leviĝis, aŭdinte la unuajn sonojn de lia lasta strofo, — nun ŝi turnas al li la kapon, — rigardas lin scivole, explore, kun miro, kolero kaj malestimo).*

### AOJDES

*(konfuzita foriras).*

### LAODAMIA

*(staras ankoraŭ, ne povas liberiĝi de l' abomen-sento; — ŝi forigas la ĥoron).*

### ĤORO

*(eliras riverencante laŭvice; Laodamia donas signon al la lasta knabino, kiu plej longe ŝanceliĝas foriri, ke ŝi alproksimiĝu).*

### LAODAMIA

*(sidiĝas; kiam la knabino alkuris, murmuretas al ŝi).*

### KNABINO

*(forkuras dekstraflanken).*

### LAODAMIA

Jam la rigard' malĉasta  
la kor-misteron trapenetas  
kaj sanktan fajron de l' voluptoj  
senhonte malpiigas.  
Ho Her! estu pli favora, —





la sang' ruĝigas miajn vangojn,  
min hont' bruligas.

— — — — —  
Ĉi-nokte devas mi ankoraŭ  
al ombroj fari la oferojn,  
elvoki Sorĉon, Fortojn:  
ke la fantomo sonĝa mia  
venu forpeli la sopiron  
kaj min kun si forportu.

*(La knabino revenas kun Maljunulino).*

#### LAODAMIA

*(donas signon al Maljunulino, ke ŝi alproksim-  
iĝu kaj al la knabino, ke ŝi stariĝu tiel  
malproksime, ke la vortoj ŝin ne atingu).*

#### MALJUNULINO

*(alpaŝas al Laodamia, genuas antaŭ ŝi; ĉirkaŭ-  
prenas ŝiajn piedojn).*

#### LAODAMIA

Vi min obeas.

#### MALJUNULINO

Ekonomino estas mi  
en domo via, sinjorino.

#### LAODAMIA

Mi bedon al vi aldonas,  
sed nur silenti vi devas.

#### MALJUNULINO

Mi vin aŭskultas, Reĝino,  
kaj, kvankam malgraŭ la volo,  
mi silentos.

LAODAMIA

Mi bedojn tri al vi donos,  
sed silentu. —

Bezonas mi tri mezuretojn  
de blanka tritika faruno.

MALJUNULINO

Sufiĉe ĝin havas grenejo.

LAODAMIA

Vi devas ĝin freŝe mueli.

MALJUNULINO

Mi mem ĝin tre zorge muelos.

LAODAMIA

Kruĉon da vin' kaj mielo  
preparu. Min bone atentu:  
samtempe, kiam krepuskos,  
vi en ĝardenon alportos  
plenajn kruĉojn kaj farunon  
kaj kaŝos ĉe la tombejo.

MALJUNULINO

Min oni rimarkos...

LAODAMIA

Ne; al mi antaŭe  
vi sendos la ŝervistinojn  
laŭ ĉiutaga nia  
kutimo...

MALJUNULINO

Vi malĝojas.



LAODAMIA

Safidon venigos vi blankan  
kaj kune la nigran ŝafinon;  
ilin vi inter cipresoj  
kaŝos for de l' tombejo,  
ligante al ŝtupo.

MALJUNULINO

Deziras vi maltrankviligi  
Mortintojn — teruro, frenezo!

LAODAMIA

Mi deziras la misterajn  
kordojn, kantojn resonigi,  
kiuj en animo mia  
per doloro, plendo sonas.  
Forlasita, forgesita —

— — — — —  
Iru for...

*(Maljunulino foriras).*

KNABINO

*(alpaŝas al Laodamia).*

Ĉu vi min sendos en urbon?

LAODAMIA

Vi tiel en urbon rapidas?

KNABINO

Tien por fruktojn alporti  
el patra ĝardeno  
vi sendas min ĉiutage;  
obeo al via ordono  
la patron mi tie vizitas.

LAODAMIA

En urbo vi havas amaton?

KNABINO

Per fraŭlinec' min punu Hera!

LAODAMIA

Ne mensogu, — donacon mi donos  
al vi kaj via amato.

KNABINO

L'amato loĝas proksime  
de mia patro; — ordonu.

LAODAMIA

Do, iru; — kiam krepuskos,  
venigos al mi vi Eunoj'on;  
Sed nur memoru silenti;  
kaj kiam vi venos al pordo,  
atendu li apud la sojlo,  
ĝis ĉiuj foriros knabinoj  
kaj mi restos sola...

KNABINO.

*(genuas antaŭ ŝi kaj ĉirkaŭprenas ŝiajn piedojn).*

Kiel surde ĝemas viaj vortoj.

LAODAMIA

Vi ridulino, estu nur kuraĝa. —  
Donu al li la nutraĵon:  
viandon, kruĉon da mielo,  
ĝis sata li estos.



KNABINO.

Ho, timas mi.

LAODAMIA

Poste kun la amato estu feliĉa  
ĉi - nokton; — revenos vi matene —  
ridu, mi estos por vi malavara.

KNABINO.

Vi sorĉojn volas veki nokte?

LAODAMIA

Amante nokton vi pasigos.

KNABINO.

Pereos vi — malfeliĉa.

LAODAMIA

Nur venigu Maljunulon.  
Mi faros, kion homa forto  
fari nur povas. — Rapidu.

(*La knabino forkuras.*)

*(Kiam la knabino malaperas post la kurteno, Laodamia kvazaŭ liberigita de la ŝarĝo de homaj rigardoj subite eksaltas de la seĝo, rektiĝas, levas pasie la manojn supren kun la vizaĝo turnita al la ĉielo; poste, plektinte la manojn, mallevas ilin large disetenditajn; ŝi klinas la kapon komence iomete, poste pli kaj pli sur la maldekstran mamon... la okuloj fermiĝas, kaj sur la vizaĝo aperas ombro de laciĝo...  
Ŝi sidiĝas kun enuo sur la vizaĝo...  
Apud ŝi sur la seĝo sidas la elirinta el sub la*

*tero Enuo: figuro en nigraj vestoj alkudritaj sur blankaj ringegoj; ŝi sidas senmove kvazaŭ ŝtono, simila al statuo, apatia.*

*La suno per oranĝkolora lumo rigardas tra la deklinita kurteno, falante per multkolora garbo en la angulon de la ĉambro, kie estas la eniro al la kuŝejo).*

### LAODAMIA

*(malfermas la okulojn kaj rimarkas Enuon; konigante al si iom post iom ĝian ĉeeston, ŝi penas per la mano kvazaŭ forpeli la vidaĵon, poste senforte mallevas la manon; tiujn samajn movojn faras Enuo).*

.... Vi venis al mi kiel gasto; hodiaŭ kiel hieraŭ kaj antaŭhieraŭ kaj dum multaj antaŭe pasintaj tagoj.—

.... Pli kara vi estas al mi hodiaŭ, fratino, ol hieraŭ, ol antaŭhieraŭ kaj ol dum la tagoj, kiuj jam forfluis,—

Vi respegulas min en via vizaĝo, kvazaŭ mi estus duobligita,—

.... Vi sidiĝas silenta kaj rakontas al mi longajn rakontojn per silento: — rakontojn mallaŭtajn, kiujn vi ŝpinas el miaj konstantaj kaj senŝanĝaj revoj kaj kiuj vagigas mian malĝojan penson ĉirkaŭ mia kastelo...

.... kaj en la ĝardenon, inter la cipresojn, tra la vojeto superŝutita per mara sablo— ĝis al la pordo de l' tombejo kaj trans ĝia fermita pordo. —

.... Kaj per la penso vi kondukas min ĉirkaŭ la tombejo, tra la ĝardeno, tra



kastelo mia al la duonombroj de l'ĉambroj, kies mi konas jam ĉiun plataĵon kaj ĉiun ĉarpentitan ŝtonon. —

Konstanta amikino de miaj pensoj, fratino sendisiĝa, —

.... Vi alvenas ĉiutage en vespera horo, kiam la estingiĝanta radio disetendas la ĉarmkoloran tapiŝon en la angulo de l'alkovo, kie estas la eniro en la kuŝejon, en kiu mi ĝuis feliĉon kun mia edzo,

.... la feliĉon tiel rapide forkurintan, tiel senrevenan, — ĝiajn kelkajn momentojn, kiuj forflugis jam por eterne.

.... La radio ŝutas oran polvon sur la sojlon de l' kuŝejo, — kaj mi estas sola. —

Mi estis dorlotita ĉi tie en la ĉirkaŭprenoj de l' edzo.

-----  
Fratino kaj mia sinjorino, vi tenas min en viaj fortaj manoj, —

.... La radio nebuliĝas en dispendigitaj polvoj kaj malaperas.

Jen kaj vi malaperas,

estingiĝas, kiel logilo de mallumaj nebuloj

-----  
Mia penso petolas kun mi, —

kaj malheligas la animon; enprofundigante ĝin en malĝojon.

Animo mia flugpendas ĉirkaŭ mi, —

la penso vagas, — kaj mi ne scias, kien ĝi celas.

*(Leviĝinte, ŝi iras malrapide en la angulon de l' ĉambro al la radio, kiu malaperas kiam ŝi ĝin atingas.*

*Eniras Dormo: junulo kun flugiloj, en vesto transpara sur la nuda marmorblanka korpo; la kapo de l' junulo estas kovrita per orhelaj bukloj; liaj vestoj ŝanĝiĝas en siaj koloroj, kiuj ĉiumomente mallumiĝas.*

*Dormo interkompreniĝas kun Enuo, kiu sendiĝe sekvas Laodamian.*

*Enuo malaperas sub la teron.*

*Dormo alpaŝas al Laodamia de l' malantaŭo kaj frapetas ŝin per bastonetoj el papavaj trunkoj;— altuŝinte ŝian frunton kaj tempiojn per trunketo, ĝi albelas ŝin per manmovoĵ ree al la lito, kie Laodamia sidiĝas post iom da tempo).*

## LAODAMIA

Jen vi alproksimiĝas alloga, di-simila—disdonanto de l' eterna ripozo.

.... Mi rekonas vin kaj vian proksimecon de la silento kaj duonombroj, kiuj vin ĉirkaŭas.

.... — Jen vi staras apud mi, ĉe mia kapo, kiun mi klinas humile:

Papavaj estas tiuj trunketoj kaj iliaj fruktaj kapetoj — maturaj kaj jam sekigintaj; skuataj en viaj manoj ili bruetas, plendas.

— — — — —  
Miaj tempioj aŭdas ilian bruon, kiu estas kvazaŭ bruo de maraj ondoj, rapidantaj al bordaj ŝtonegoj. —

Miaj okuloj estas jam duonfermitaj. — Bruas la ondoj de malproksimaj maroj, al ŝtonegoj, al ŝtonegoj, al bordo....



Jen la sablan piriton forportas la ondoj;  
ĝi kraketas traŝutata de miloj da manoj:  
bruas la aro de Nereus'aj filinoj;  
plektigis la brakoj de la nimfoj.  
Jen el malproksimo, el grandaj maroj  
alkuras flugantaro de Okeanidoj: —  
jen ili diserigās rebatitaj de la bordo.  
Ekkrako, bruo....

*(subite pli laŭte, pli kompreneble).*

— Kaj vi alvenis dormigi min per la bruo  
kaj murmuro de akvoj...  
Mi alkutimis al vi — elsendito de misteraj  
fortoj....

*(pli mallaŭte)*

Min dorlotas via ĉirkaŭprenanta brako:  
Dormo, Dormo... mia mondo, —

— — — — —

Amato mia!

*(La ĥoro trapaŝas la ĉambrom kaj vidas Laodamian dormiĝantan; ĝi alproksimiĝas, rigardante sin unu momenton; — la knabinoj disiras en la ĉambro. — La proksimeco de Dormo agas sur ilin, kaj post momento de intermurmuretoj ili kuŝiĝas dormemaj sur la teron apud la kurteno kaj ekdormas.*

*Dormo alvokas Inkubon.*

*Inkubo (Onejros) deflugas el la aero en formo de timigilo grizkolora, kun membran-havaj flugiloj de nokta papilio, ornamitaj de strangaj zigzagoj; kun granda papilia masko sur la kapo kaj maltrankvilaj blankaj okuloj; laŭlonge de la supervesto — purpuraj strioj.*

*Dormo interparolas kun Inkubo, montante la dormantan Laodamian; poste li foriras post la blankan kurtenon, deklinante ĝin iomete; — la foriron de Dormo la dormantoj montras per malgrandaj ekmovoj.*

*Inkubo, leviĝante en la aero super la dormantaj knabinoj, elvokas vidaĵojn sur la kurteno. La kurteno kuntirata dekliniĝas:*

*La sonĝo de Laodamia prezentas sin kiel viva sceno, lumanta per bluj koloroj:*

*Sur la fono de safira maronaĝas antaŭen granda ŝipo kolorigita ruĝe kun disvolvita velo, ĝi naĝas inter ĵetiloj kaj sagoj, ĵetataj de iaj nevidataj manoj. Sur la ŝipo staras armitaj batalistoj, levante supren la ŝildojn kaj lancojn.*

*Sur la antaŭo, ĉe la fronto de l' ŝipo staras juna heroo kovrita de ora armilaro kaj tenas supre kelkajn ponardegojn; sur la maldekstra brako li havas ŝildon forĝitan per najloj.*

*Tra la ponteto, kiun oni ĵetas sur la bordon, dekuras la heroo, flugante kvazaŭ blinda kontraŭ la ĵetiloj kaj sagoj.*

*Neniu sukcesas lin sekvi; la homoj sur la ŝipo tuj suprenlevas la ponteton kaj retiras ĝin sur la ferdekon.*

*Protesilas estas fortranĉita, lasita sola; — oni aŭdas bruon de l'batalo, la heroo falas).*

## LA VOĈO DE PROTESILAS

Laodamia, Laodamia!

*(La homoj starantaj sur la ŝipo levas danke la manojn al la ĉielo. En la malproksimo oni vidas multajn ŝipojn naĝantajn antaŭen).*

## LAODAMIA

*(ĵetas sin maltrankvile dum la dormo)*



Vin nubo kovras da jetiloj!  
Haltu!  
Post vi retiras oni ponton!  
Perfido!!!  
Helpon! helpon!

— — — — —  
Ah... Profetaĵo!

## LA VOĈO DE PROTESILAS

(malfortiĝanta)

... Laodamia!...

*(Tra la jetitaj pontetoj multaj herooj suriras la bordon; oni aŭdas bruadon de popolamasoj).*

### LAODAMIA

*(deŝoviĝas el la lito; duongenuas sur la planko, kaj ektuŝinte ĝian malvarman plataĵon, rekonŝuiĝas, — ĉirkaŭprenas per la manoj siajn harojn kaj ambaŭ templojn kaj rigardas per larĝe malfermitaj okuloj antaŭen. —*

*La fantomoj malaperas kaj la murmuroj eksilentas. La kurteno kuntiriĝas. Laodamia rektiĝas, kunvolvas la harojn sur la posto de l' kapo, prenas malpezan korpkovrilon kaj antaŭ ol ĉirkaŭvolvi per ĝi la kapon, ŝi iras kun tiu ĉi komencita gesto kelkajn paŝojn antaŭen al la maldekstra pordo.*

*Tra la fermita bronza pordo de la maldekstra flanko iras tiun saman vojeton ŝin renkonte Hermes, — nuda en mallonga mantelo malsuprenfalanta de la brakoj, en ĉapelo ornamita per flugiletoj, kun kaduceo en la maldekstra mano. Li haltas, kiam Laodamia lin rimarkas.*

*Hermes staras rekte, senmove.*

*Laodamia staras kvazaŭ hipnotizita de l' vidaĵo,*

*tenante en la manoj la kovrilon malproksime de la vizaĝo, kaj iras per duonmovo).*

## LAODAMIA

— Malĝoja mi estas virino, edzino de l' heroo Protesilas.

— En via figuro, elsendito de l' infero mi rekonas la kurieron de l' subtera tri-regno:

— Vi antaŭkuris la nokton kaj perfortigis la pordistojn de Hades, kaj jen vi staras antaŭ mi, lertmovema, kun la terura kaj potencula serpentbastono en la mano.

— El viaj okuloj malproksimvidantaj mi legas ne aŭditan jam de centjaroj sciigon similan al songaj fabelaj — kiu por mi per via ĉeesto fariĝas viviga kaj feliĉiga: — jen estas miaj larmoj,—vi diras al mi, jen la plendo de mia amo, sopiranta al ĉirkaŭprenoj, jen pertisteco en la dezirado de voluptoj kun la edzo, kiun mi ekkonis,... la volon de Orkus neinklinan al kompato, ili trapenetrus per granda kompato.

— Vi—elsendito radianta per feliĉigonta min ordono ŝajne volas promesi al mi, ke mia edzo revenos al mi por kelkaj momentoj...

## HERMES

*(per malrapida movo de la dekstra mano klinas al si sian serpentforman bastonon).*



## LAODAMIA

— Filo de Maja, kiu distranĉas la mallumon de Nokto per sia serpenta, terure kunplektita bastono —

— jen, kiam la nokto kovros per nigra tavolo la bordojn de Phylace,...  
vi alkondukos el sub la tero lin mem, sopirantan al mi, — kiu lin deziregas.

## HERMES

(malaperas)

## LAODAMIA

*(Staras en tiu sama movo mallongan momenton, poste transiras el la ridetanta konsiderado en vivan ĝojon, gajecon ĝis ŝi eksplodas per rido kaj deturninte sin vigle, rimarkas la dormantajn knabinojn, al kiuj ŝi alkuras vekante ilin; la ekvekitajn ŝi amasigas ĉirkaŭ si sed pro la troa ĝojo ŝi ne povas elparoli eĉ unu vorton; nur ridanta kaj feliĉa ŝi montras per gestoj, ke ŝi oni devas ornami per floroj la loĝejon).*

## HORO

De kie venas tiu ĝojo,  
kaj vi subite  
ornami volas la kuŝejon?

## LAODAMIA

Jen min aŭskultu servistinoj:  
mi kronojn plekti  
deriras nun.

## HORO

La ĝoj' heligas vian frunton.  
De kie venas  
la gajeco  
kaj ruĝo kovras vangojn viajn?

## LAODAMIA

De l' koro voĉ' min vokas ĝoja;  
gaja per koro  
mi vokas gaje:  
al kronplektado servistinoj!

## HORO

Vin de la koro voĉo vokas;  
ĉu ĝi ne trompas?..  
Ĉu ne allogas sort' perfida  
sur trompan vojon vin?..

## LAODAMIA

Hej, servistinoj la obeaj,  
en bronzaĵ ingoj la kandelojn  
bruligu...

## HORO

Krepusk' jam falis,  
la tag' kliniĝas  
al' ombr', — al nokt'.

## LAODAMIA

De mia koro  
turmentoj longaj  
al fin' alvenas jam  
*(kun la ĥoro ŝi iras al la antaŭo de l' scenejo).*



Al flamanta fajr',  
en kuprajn pladojn,  
ĵetu cipresojn,  
mirron kaj linon  
ke el varmega fum'  
flugu reviga sorĉ'  
de l' Dorma song'!

### HORO

La Dormfantomoj ŝin turmentas  
Larvoj kaj Nokt'.

### LAODAMIA

Vidaĵoj harpon alagordas:  
Erosa fort'!

*(La parto de la ĥoro plenumas la ordonojn de Laodamia; la dua parto alportas por ŝi multekostajn kol-ornamojn, orelajn ringojn, kap-ornamojn, zonon, cirkaŭligaĵojn, parfumojn, bonodorĵaĵojn).*

### LAODAMIA

Sur nigran la graniton  
falu rozpluv' odora...  
For la tagiĝo pala  
kun ruĝ' matena  
for!  
Haltu ĉevaloj Febaj!  
Eros! Eros!...  
Ŝiru el ĝardeno branĉetojn hiacintajn,  
ŝiru branĉetojn jasmenajn;  
kufojn blankajn ekflorantajn  
en faskojn plektu vi kune! —

Florojn!... ĝis sato!

Eros! Eros!

kusenojn kovru miajn per skarlato  
kaj lanojn sternu molajn  
por ke alvenu song' reviga.

*(La knabinoj dume ornamas per floroj la cambron kaj la kuŝejon).*

### LAODAMIA

Eros, Eros vi mia,  
ho, aminfano,  
deflugu al mi  
por ornami  
per florgirlandoj odoraj  
kaj kronoj  
la liton de l' amatino  
en sopiro velkanta.  
En koron mian penetris  
la sago via, la ora.

### HORO

*(foriras, fininte la ornamadon de l' kuŝejo kaj riverencas laŭvice;*

*Laodamia forkondukas per rigardo ĉiujn knabinojn kaj al ĉiuj ridetas adiaŭante; laŭvice foriras ĉiuj. Venas nokto luhela.*

*La blanka kurteno disiĝas je la tuta larĝo de l' ĉambro; oni vidas la kastelan ĝardenon, la cipresajn aleojn; meze—la tombejo de Protesilas, turnita antaŭen kun sia tombkolono; profunde, malproksime—la muro ĉirkaŭanta la ĝardenon; stonegaj bordoj, — maro; apud la sojlo ekstaras Maljunulo, kiu sidis tie kaj atendis).*



MALJUNULO

Vi min alvokis, kara ido,  
veni ĉi tien.

Jen estas mi, reĝino mia, —  
sklav' via kaj zorganto  
el lando via malproksima.

LAODAMIA

(*enpensiginta*)

Jes, malproksima...  
Zorgant' de miaj junaj jaroj,  
mi vin salutas.

MALJUNULO

Vi petis, ke mi venu...  
Pri vi mi timas.

LAODAMIA

Pli ol iame mi sentas min forta;  
nur arton bezonas mi vian;  
vi scias elvoki la ŝorĉojn.

MALJUNULO

Infano, ĉu punon ne timas vi dian?

LAODAMIA

Nur nun mi havas la kuraĝon.  
Antaŭe timo min penetris  
kaj pens' pri ŝorĉoj min tremigis,

— — — — —  
Al vi mi havas nur konfidon.

### MALJUNULO

El via lando mi trenis min ĉi tien  
en la tag' de via edziĝo,  
kiam forrabitan el la patra domo  
via amato kaj edzo forportis vin en Phylace.

### LAODAMIA

La tag' de mia edziĝo!

### MALJUNULO

Via patro kontraŭa al ĝi  
baris al vi per malbeno  
reiron...

### LAODAMIA

Tien pri mi forportu la rakonton  
kun lasta mia la saluto  
por mia hejm' kaj via land',  
en Jolkon, kie Peleido —  
Akastos reĝo naskis min  
por suferado kaj turmentoj.  
Min tombo jam atendas...

### MALJUNULO

... Min petis vi alveni.

### LAODAMIA

En song' min vokis iu;  
nomo mia kelkfoje estis ripetita  
de voĉo, kiu kvazaŭ eĥo sonas  
en la memoro.



MALJUNULO

De mi kor' via kaŝas la sekreton?...

LAODAMIA

Mi vian volas aŭdi profetaĵon.

MALJUNULO

Mistera mia profetaĵo pelos  
el koro via la lastajn esperojn,  
do ilin ne postulu:  
la vortoj surdaj estos por la koro.

LAODAMIA

Min la deziro mistera ardigas...  
Vin mi faros libera.

MALJUNULO

Ho, ne petolu kun sorto,  
ne ludu tiel facilanime  
kun jura vivo.

LAODAMIA

Nun mi kompenis jam sorton mian:  
turmentoj nur kruelaj  
atendas min.  
Amon mi vidis oferitan  
al vana glor' de himnoj.  
Al mi do restas nur sopiri  
al frua mort'.

MALJUNULO

Hejmen al patro iru humila  
kune kun mi — nun jam libera.

LAODAMIA

Al tomboj ĵuras mi la amon,  
for patro, kiu min malbenas!

MALJUNULO

Kor' mia saltas de teruro:  
forĝegas patron la filino,  
al li malbenon sendas!

LAODAMIA

La patr' forĝesis min antaŭe.

MALJUNULO

Plend' menson vian erarigas.

LAODAMIA

Mi malfeliĉa volas ĉi-nokte  
feliĉon ĝui amante,  
ke post disiĝo longedaŭra  
al mi deflugu Hermes  
kaj l' edzon alvenigu.  
Ofer' de lakt', miel' kaj vino,  
ofero de faruno blanka  
devas farita esti.

MALJUNULO

Inferaj fortoj vin bruligas.

LAODAMIA

Vi konas ja misterajn fortojn.

MALJUNULO

Por vivo estas vi perdita.



## LAODAMIA

Min fortimigos nek malbenoj  
kaj nek minacoj de l' infero.

## MALJUNULO

Vi freneziĝas, malfeliĉa.

## LAODAMIA

*(montras per la mano la tombejon).*

Jen estas pretà la ofero;  
sed kion fari, diru laŭvice,  
kiajn donacojn meti antaŭe,  
ĉu pan-donacojn?  
Kaj kion verŝas oni antaŭe,  
ĉu lakton, aŭ mielon,  
antaŭ ol sango satenutros  
la vag-animojn?  
Kiel rekoni, diru, la edzon inter la ombroj?

## MALJUNULO

Vi tremas. — — — —

## LAODAMIA

Kiam la rito estos finita,  
vi al la pordo iros ĝardena,  
kiun mi mem ĉi-matene lasis  
malfermita,...  
tie ĉiutage sur rokoj sidante, rigardas mi  
la maron:  
... el tiuj landoj alvenigis min boato por  
mia fest' edziĝa.

En la haveno vi trovos grandan boaton  
kaj du servistojn—vilaĝanojn.

*(ŝi detiras de la brako la edziĝan ringon kaj  
redonas ĝin al li).*

Vi montros al ili tiun ĉi koralon enkadrigitan en ora ringo.

Ili forveturigos vin malproksimen —  
al via kaj mia patrujo.

### MALJUNULO

Tie estas miaj filoj kaj nepoj;  
mi dankas, reĝino.

*(Laodamia kaj Maljunulo iras profunden kaj  
stariĝas apud la tombejo).*

### MALJUNULO

Kavigu per tranĉilo  
teron laŭ long' kaj larg'  
kaj verŝu en la kavon  
glason da vin',  
pokalon da mielo,

de l' fonta akv'—kalikon  
kaj supren per faruno  
kovru l' oferon tutan.

Tiam vi preĝojn tri  
kun petoj kaj jeĵuroj  
komencu por ke ombroj  
vekiĝu en la tero.

— Kaj preninte ŝafidon blankan, ĉastan,  
vi turnos ĝin frunte al Erebo, — kaj tranĉos  
os ĝin,  
ke la nigra sango tuta elfluu en la sulkon.



— Kaj poste preninte ŝafinon nigrolanan,  
ĉastan, vi turnos la beston frunte al  
Erebo, — kaj tranĉos ĝin,  
ke la sango nigra tuta elfluu en la sulkon.  
— Vi mem deturnu la okulojn de la ofero  
kaj la manojn etendu super ĝi.

*(Kiam li parolis, si faris ĉion, kion li ordonis;  
animoj alflugas el sub la tero kaj rondiras  
ĉirkaŭ la kavon).*

#### LAODAMIA

Vidu, vidu, kiel ili  
ploregantaj sopirantaj,  
ombroj junaj kaj maljunaj,  
knaboj, viroj kaj virinoj  
kavon are ĉirkaŭflugas;  
ŝimo brilas en l'okuloj,—  
ili klinas sin al kav',  
avide trinkas;  
— la edzon mi ne vidas  
eble forestas li?  
Antaŭ alveno lia  
fremdaj eltrinkos sangon!

#### MALJUNULO

Kuraĝe prenu vi palison,  
la fremdajn pelu for.

#### LAODAMIA

Vane, tuj ili reaperas  
per grandiganta aro  
kun siblo, sifl' kaj bruo.  
La edzon mi ne vidas,  
eble forestas li?

Trompis min song', —  
nur fremdaj nutras sin animoj.

#### MALJUNULO

Hejmen revenu malfeliĉa,  
senfrukta la sorĉado:  
ne venas via edzo.

#### LAODAMIA

Vane animon la animo  
serĉas rompante la misterojn,  
ne timas punon mi;  
mi — malfeliĉa, ho malfeliĉa.

#### MALJUNULO

Ho ĉesu plori, ĉesu ĝemi,  
senfrukta la sorĉado. — Mi iras for,  
ĉambron revenu, aŭdu averton:  
plor' via nur turmentas lin;  
animo lia mallibera  
de plend' senĉesa kaj de larmoj  
flugas tra spacoj de l' infero  
jen reiĝante, jen mortante;  
ĉirkaŭvagigas ĝin sopiroj  
de l' sanktaj boskoj ĝin forpelas.

*iMaljunulo foriras en la ĝardenon; oni vidas  
(iel li malproksime trapaŝas la pordeton, post,  
kiu li malaperas).*

#### LAODAMIA

*(apogita ĉe la tombejo).*

De l' sanktaj boskoj ĝin forpelas  
senĉesaj miaj plendoj larmoj;



ĝi ĉirkaŭvagas de sopiroj  
jen reĝante, jen mortante.  
Ho, estu do mi malbenita,  
al plor' kaj plendoj oferita,  
sed la anim' amata, kara  
al mi aperu por momento  
jeĵure elvokita.

*Ploranta ŝi staras apud la tombejo,—iom post  
iom eksilentas ŝiaj larmoj kaj ĝemoj, ŝin tra-  
penetras timo..., terurigita ŝi ĉirkaŭrigardas  
duonmorte, kiel ekregis ĉirkaŭe silento kaj aperis  
noktaj nebuloj.*

*Tra nebuloj lumas la luno sur la tutan ĝardenon.  
La tombejo malfermiĝas per malluma profund-  
aĵo. Eliras Hermes alkondukante je la mano  
Protesilas'on. Protesilas iras kun la klinita  
kapo, kovrita per heroa vesto: brilanta armilaro  
kaj kiraso, bronza zono, kaj tibi-sirmiloj. Her-  
mes redonas la manon de Protesilas en la manon  
de Laodamia kaj foriras, malaperante en la  
ĝardeno).*

#### LAODAMIA

Jen estas mi — edzino via  
kaj vi estas mia.

— — — — —  
Kiraso via poluras  
kaj brilas kasko, zono kaj ponardo; —  
same bela vi estas, kiel antaŭe,  
nur la vangoj estas palaj.  
Nigraj okuloj viaj rigardas min per mal-  
lumo de nokto;  
vian frunton kovras nigraj harbukloj; sur la

tempioj — nigraj harbukloj kuntiritaj per  
oraj ladetoj...

nur via frunto estas blanka, kiel la ŝtonoj  
de l' tombejo;

via frunto estas trankvila, kiel la tombo  
kovrita per marmora plato.

Nek kvieto, nek maltrankvilo

lumas sur via frunto

— — — — —

*(ŝi metas ambaŭ manojn sur la brustkovrilo de  
Protesilas).*

Jes, ĝi estas via kiraso multfoje zigzage  
forĝita per oraj najloj kaj ringaj radoj;  
en ruĝa rezino estas trempitaj la arte  
plektitaj hartuberoj sur via kasko — la ha-  
roj de l' cevalo, kiun vi mem kaptis en la  
largaj herbejoj de Ptelea, en la kampoj  
bruantaj per densaj kaj altaj herboj.

Jen la mirinda zono, kontraŭstaranta plej  
fortajn ekbatojn kaj eĉ la ŝtilojn de  
Apollo — la donaco de mia patro.

Heroo, jen vi staras antaŭ mi fama kaj  
glora.

### PROTESILAS

*(altuŝas ŝian frunton per la mano).*

### LAODAMIA

Via mano estas blanka kaj malvarma;  
vi venas el malproksimo...

al mi — via edzino sopiranta al vi,  
avidanta viajn ĉirkaŭprenojn. Edzo mia,  
vi lasis min sola en miaj junaj freŝaj jaroj.



Nun Gloro revenigas vin al mi.  
Ĝi karesiĝas en la briloj de via kasko,  
de via kiraso; nur la brilo de viaj okuloj  
estas duonombrita, nur viaj vangoj estas  
palaj.

*(Si altuŝas ambaŭmane per la fingroj lian  
vizaĝon).*

Via vizaĝo estas malvarma.  
Vi venas al mi el malproksimo.  
De via larĝa brusto,  
de via koro atingas min malvarmo,  
de kiu rigidiĝis miaj brakoj.

### PROTESILAS

*(etendas al ŝi la manon).*

### LAODAMIA

La koro haltas en mi, avide mi aŭskultas,  
ĉu via koro batas....  
Via koro silentas....

*(ŝi falas en la ĉirkaŭprenon de Protesilas).*

Ho amu, karesu, dorlotu vi min...  
ho kiel longe mi estis sola, ho kiel longe...  
la vortoj de amo velkis neelparolitaj  
sur miaj lipoj.  
Ho alpremu mi per la brakoj, ĉirkaŭprenu  
varme...  
Ho dolĉo....  
Ho kiel longe, kiel longe vortoj  
de amo estis por mi kvazaŭ mok-vipado....  
Vi revenas el la milito.....  
Vi revenas al mi.

## PROTESILAS

(*ĉirkaŭprenas ŝin*).

(*Ŝi svenas en la brakoj de Protesilas, falante per la frunto sur la metalon de lia kiraso;—kaj tuj rekonsciiĝas*).

Kiel surde respondas al mi via kiraso,—  
kvazaŭ ĝin ne plenigus viva brusto kaj forto  
heroa;—en vanaj sonoj perdiĝas miaparolo.  
Vi estas ja viva,— vi staras apud mi.

## PROTESILAS

(*klinas al ŝi malrapide la kapon*).

## LAODAMIA

Via vizaĝo brilas svenante,  
ĉu arma ĝi estas rebrilo?...  
La okuloj — kvazaŭ nigraj profundaĵoj,...  
Mi eniras en iliajn abismojn.—  
Nokto, — miaj pensoj estingiĝas.

## PROTESILAS

(*kisas ŝin*).

## LAODAMIA

Mi kisis vian glacian buŝon;  
malvarmo eniris en mian bruston;—  
animo mia svenas de la kiso  
kunigita kun la via:  
nun mi estas tiu, kiu ne sciis antaŭe

— — — — —

1. Antaŭ mi estas abismoj,  
mallumoj nepenetreblaj.  
Malproksime vagas nebulaj fantomoj...  
Ili miksiĝas, plektiĝas per ringoj kaj  
malaperas malfermante lumojn...



La lumoj postkuras unu la alian,... vestigas  
per nebuloj, vetkuras brulante, —  
malproksimen de mi kaj dronas kiel ombroj.

— — — — —  
Mi eniris en la Eternecon.

2. Jen rivero, jen respegalantaj akvoj, kiuj  
post mi sin trenas en nokton; mi trairis  
jam grandegajn spacojn da ili;  
sufokanta nebulo vagas super tiuj ĉi akvoj.

— — — — —  
3. Sub la mano mi sentas graniton, ŝtonon,  
rokon netrapenetreblan,  
jen mi altuŝas ilin per la mano, — mi  
sentas premegon, miajn brakojn mi ne  
povas jam disetendi, — ŝtonegoj,  
ŝtonegoj... ili plenigas la tutan vojon...  
mi devas iri... post mi, antaŭ mi iras  
nekonatoj,—Eterneco....

4. Jen la pordegoj, triumfaj arkoj ĉarpentitaj  
el laktoblankaj ŝtonoj; ĉu per tiu ĉi vojo  
Helios rulas sian oran ĉaron irante ripozi?...  
Pordegoj sennombraj, — konstruaĵo de  
l' centmanaj gigantoj....  
.... Jen mi trairas la lastan

— — — — —  
5. Lazuro, lazuro.... dormemo....  
Mi scias, ke mi devas iri antaŭen, antaŭ-  
en.... sed la dormemo de lazuroj fleksas  
miajn genuojn kaj la manoj premiĝas al  
la vizaĝo kvazaŭ por dormo....  
Ripozi nur por momento,... Eterneco...

6. Herbejo, herbejo,... oceano da oraj floro-  
etoj... herbejo sen fino,—  
kiuj estas ili, similaj al mi, kiuj balanc-  
iĝas super la floroj?—

Kiel granda estas la mondo.

Ĉu ili kolektas florojn? — ne ili nur en-  
spiras la florodoron; kia agrabla, vivigaodoro...  
ĝin mi povas do ankaŭ enspiri,—mi estas inter  
ili... Resti...

Jen mi estas sur tiuj ĉi oraj herbejoj kaj  
ŝajnas, ke mi estas ilia ido, kiam mi vidas, ke  
la animoj de mortintoj revivigitaj de interpa-  
rolo promenas libere...

Tio estas la estonta mondo kaj mi ani-  
mo en ĝi.

— — — — —  
Kies brakoj altuŝas miajn femurojn kaj  
kolon mian alpremas al sia brusto?...

Ĝi estas vi—mia amato, edzo karesita!

Restu do ni kune jam nedisigeblaj...

— — — — —  
..... Tie en Phylace, kien vi forveturigis  
min forrabiton el la patra domo,... tie mi estis  
sola, vane vin atendanta, sed tie ĉi, tie ĉi vi  
estas kun mi amanta kaj obea.

Mi estas kara al vi, kiel neniam antaŭe.

.... Tie en Phylace, kie vi konstruis domon  
por ni, palacon el marmoro kaj bronzo, el fagaj  
ĉervonoj kaj abiaj traboj bele ĉarpentitaj,  
estis nia amo dolorplena —

.... Kaj tiom da larmoj kaj maldolĉo su-  
fokis mian gorĝon kaj spiron,—ĝis fine hodiaŭ



mi ree sentas en la buŝo dolĉon kaj spiras aromon, ke mi atingis la feliĉon.

Kara mia, jen nian amon rigardas herooj kaj knabinoj, rigardas reĝoj, kiujn mi konas el la rakontoj de mia zorgantino kaj el la instruoj de l' patro, — rigardas tiuj, pri kiuj al mia patro, kiam li estis infano, rakontis liaj zorgantinoj kaj iliaj gepatroj. Jen preteriras nin tiuj, pri kiuj oni iam kantis al mi; — mi mem kantetis al mi tiujn kantojn kaj miaj servistinoj kaj samaĝulinoj akompanis min sonigante la kordojn el ŝafidaj intestoj, kiuj estis ĉirkaŭvolvitaj sur la kranio de nigrokorna bovo....

Sed tiu ĉi kordsonado sub la manoj de miaj samaĝulinoj estas jam por mi malproksima, mi jam forgesis ĝin...

.... Jen tie,—en Phylace ĝi restis kaj duonvoĉe vagas en la ĉambroj kaj min reĝan filinon kaj reĝan edzinon jam ne lulos al dormo sur purpuraj kusenoj, sub tukoj el belornamitaj teksaĵoj surŝprucigitaj de aromaj balsamoj....

Ĉar la tempo de sonĝoj jam finiĝis por mi kaj mi eniris en la Eternecon — — — —

— — — — —  
kaj vi kun mi, apud mi, vi mia kara.  
— — — — —

*(Ĉirkaŭprenante per la manoj ŝi kaptas nur malplenecon,—trifoje ŝi penas ĉirkaŭpreni la ombbron de Protesilas, kiu malaperas inter cipresoj en la ĝardeno).*

*(El la ĉambro eliras Ĥoro kaj ĉirkaŭas Lao-damia'n).*

### ĤORO

Ridet' ĝojigas vian buŝon,  
brakon etendas vi volupte,  
kion vi kaptas, ĉirkaŭprenas...?

### LAODAMIA

En spaco svenas miaj manoj,  
de amdeziroj ardas korpo.

### ĤORO

Sed kiun vidas vi proksime,  
ke la okuloj ame brilas,  
la brakoj dronas en la spaco?

### LAODAMIA

Vane etendas mi la brakojn  
al la fantom' neatingebla;  
en aerondo dronas manoj.

### ĤORO

Forflugis jam rideto —  
flamas nur rozaj vangoj;  
vane sin levas manoj viaj:  
nenion kaptos vi.

### LAODAMIA

Ĉirkaŭas min nur trompaj logoj,  
forflugis la rideto;  
restis en buŝo mia  
nur vorto de deziro;  
nenion kaptas mano,  
la brako dronas en la spaco.



## HORO

Malĝoje klinas vi la kapon,  
la frunton kovras ŝvit' malvarma,  
svenas la voĉo, la vangoj—palaj,  
nur flamo brilas en l' okuloj.

## LAODAMIA

La koro tremas de teruro:  
min erarigis trompaj logoj  
la vid' ombriĝas, paliĝas vangoj,  
la frunton kovris ŝvit' malvarma...

## HORO

Sopire klinas vi la kapon,  
doloran kovras la vizaĝon  
vual' el nigraj haraj bukloj.

## LAODAMIA

Vane etendis mi la brakojn  
allogan ombron alpremante;  
trifoje kaptis ĝin la manoj,  
sed vane ili sin etendis,  
tremante de voluptoj.

*(Ĉi tie ŝi iras al la antaŭo de l' scenejo, post ŝi — la horo).*

Vi blankan metu la kovrilon  
sur miajn nigrajn buklojn,  
ke tiu vasta longa vesto  
forkaŝu min de l' mondo.  
Trompita en la amdeziroj  
Harpiajn sentas mi la ungojn  
vundantajn koron mian;

ke dezirtremojn,  
l' animon plenan de teruro mi kaŝu for,  
ke nur mi mem sub la kovrilo  
rigardu plendon, larmojn miajn,  
ke kun doloroj kaj suferoj  
de nun mi restu sola.  
Min ne ĝojigos jam nenies  
dorloto, amo  
kaj vort' karesa,  
eĉ se ĝi sonus per Ĥaritaj ĉarmaj tonoj,  
eĉ se liuto de Apollo ĝin akompanus.

#### ĤORO

Vin la purpura lit' atendas,  
la lanaj molaj tukoj  
al dorm' redonos ĉarman korpon.

#### LAODAMIA

*(forŝirante de si la ornamojn kaj forĵetante ilin)*

De brusto mia  
forprenu la tintilojn orajn,  
en ĝin penetris sufokanta sveno;  
ringoj serpentaj min bruligas,  
la bronza kristaldiademo tropezas  
kaj premas la frunton;  
la femurligiloj mordas min volupte,...  
la deziroj dronas nesatigitaj.

#### ĤORO

La herbaromo el kuŝejo  
sin levas fume  
mistera brulas ama flamo  
de Amoroj.



Rigardu: jen el fumaj ringoj  
leviĝas ombroj super lito.

#### LAODAMIA

Blankiĝas liliaj trunketoj belkreskaj,  
la bruston plenigas aromoj;  
disvolvitaĵaj harligoj  
trempitaj en suko de rozoj kaj hiacintoj  
ame ekscitas  
kaj en la korpo sopiranta al ĉirkaŭprenoj  
elvokas rememorojn, kiuj min turmentas  
per deziroj, — la aromo svenigas min.

#### ĤORO

Jeĵuru trifoje  
pelu fantomojn, kiujn naskas freneza penso,  
prenu papavan trunkon,  
per seka floro frapu malĝojan frunton  
kvarfoje, tiam alvenos dormo,  
kiu kvietigos vian malĝojon.

#### LAODAMIA

Dormo de Solulino...

— — — — —  
Ne premos min en la pasiaj brakoj  
l'edzo—amato;  
antaŭ mi staras fantomo en formo nebula  
kaj ĵetas malĝojajn brilojn el la okuloj.

#### ĤORO

Pens' laca vin kondukas  
en rondon de tromplogoj;

eniru en la liton  
kaj ĉesu malesperi  
sencele plendas buŝo via.

LAODAMIA

Malplena estas mia lito.

— — — — —

Kompatu min mizeran.

ĤORO

Kompaton vi forpelas mem...  
kiel vi sola, sopiranta  
vagos dum nokto la malluma?

LAODAMIA

*(iras en la profundon de l' scenejo, rigardante  
la maron).*

ĤORO

La veston surŝutas per rosaj perloj nebulo,  
Notus—malvarmo alflugas de l' ondoj.  
Kiun vi atendas, kiun vi divenas,  
rigardante malproksiman nebulon?

LAODAMIA

Tra la nebula spac',  
tra nigra brua mar'  
alnaĝas ŝip' silenta.

ĤORO

Kvazaŭ statuo staras ŝi,  
retenas spiron en la Brust',  
aŭskultas eĥojn ventajn.

LAODAMIA

Aŭskultas mi la eĥojn ventajn,  
malvarm' alflugas de la mar',  
la ond' balancas ŝipon;



sur ŝip' nebula ombro staras,  
sur ondoj balanciĝas,...  
ĝin ruĝokula remas  
grizhara maljunulo,...  
Ĥaron! — Boato haltu!  
haltu mistera ombr'!  
Forprenu ankaŭ min...

### HORO

Ho malfeliĉa! Kiun ŝi alvokas?!  
L' infer' senditojn al ŝi sendas!...

*(Sur la kurteno, kiun kuntiris la Ĥoro oni vidas en nebulaj koloroj kvazaŭ grandan lagon; ŝaŭmantaj ondoj rebrilas sur ĝi inter nigraj profundajoj; — naĝas granda boato kaj en ĝi staras grizhara Ĥaron kun flamantaj okuloj kaj remas...)*

*La ombroj de l' animoj envolvitaj en blankajn mortkovrilojn staras amasigitaj kune kaj ploras ĝeme).*

### LAODAMIA

*(rigardas la vidaĵon kvazaŭ freneza)*

Vi kies la animojn  
en blankaj mortkovriloj  
en luna lum' kondukas  
al nokto la eterna?  
Fantomoj ĝemas, ploras  
kvazaŭ vesperta aro  
premanta sin de timo  
en truoj sub tegmentoj.

*(la vidaĵo malaperas).*

## LAODAMIA

*(elsiriĝas el la ĉirkaŭprenoj de l' Hôro).*

Kuraĝe li distranĉas  
per ŝip' la maron larĝan,  
gloramo lin mortigas,  
laŭr' kronas lin.

Mi sola ploras, ĝemas  
ĝis l' amon venkos Morto,  
al mi redonos l' edzon  
misteroplena Orkus.

Hodiaŭ plend' multobligita  
disŝiras koron mian;  
pli flame preĝas mi hodiaŭ,  
Hera!—mi estas malfeliĉa.

Soleco mia malespera  
disŝiras koron mian,  
minacojn super mi arigas  
la venĝavida Dike.

Aŭskultu min, diin' plej sankta:  
suferoj premas min terure,  
Hera!—mi estas malfeliĉa!

La fremdan amis mi heroon,  
knabinon li forrabis min  
el patra domo en la sian;  
la patro min malbenis...

Ĉu venos fin' por larmoj miaj,  
Ĉu mi plenumis ian kulpon...?  
Hera!—mi estas malfeliĉa.

El ĉirkaŭpreno flama mia  
heroo kuras for trans maroj,  
ekamis li batalan gloron  
kaj ploron mian ne aŭskultas;  
al li profetas oni morton, —



lin glor' de morto logas;  
fororgesas li edzinon sian;  
malplena restis mia domo,  
mi juna velkas en soleco...  
Ĉu venos fin' por larmoj miaj...!?  
Hera!—mi estas malfeliĉa.

-----

Min mokas Sorto,  
Songo kaj Sorĉo,  
ludas kun mi kruele;  
min persekutas dia puno,  
kaj ploras koro mia

-----

*(ŝi jetas sin antaŭ de la scenejo).*

-----

Por mi nur restis morto!


-----

*(ŝi trapikas la bruston per ponardo kaj falas).*

*La knabinoj metas sin sur la liton; ili disŝovas la kurtenon por kunvoki la domanojn; la domanoj alkuras; ĉiuj kun timo ariĝas ĉirkaŭ la mortinta reĝino.*

*Profunde, tra la ĝardeno iras la animoj de Protesilas kaj Laodamia; alpremante sin reciproke ili iras malrapide al la tombejo kaj malaperas en la malluma faŭko de la tombejo; la bronza pordo brue fermiĝas post ili.*

*Ĉe la ekbruo de la fermiĝanta pordo de l' tombejo ĉiuj kapoj de l' Ĥoro subite turnas sin al la ĝardeno.*



## Stanisław Wyspiański.\*)

Antaŭ kelkaj monatoj la pola literaturo kovrigis per funebro post la morto de unu el ĝiaj plej eminentaj kaj originalaj nuntempaj poetoj.

„Granda, nekomprenita li foriris, sufokita de turmentoj de sia grandega laboro, inter amasego de siaj pentraĵoj, kiujn li eligis per reĝa mano el la flamanta cerbo, kaj al kiuj la vivo de l' senlibera popolo ne donis vojon kaj aeron.“

Tiuj ĉi vortoj, per kiuj komencis sian parolon pri Wyspiański la konata pola literaturisto kaj nia malnova samideano Belmont, bone karakterizas la krea talenton de l' mortinta poeto kaj la rilaton al li de liaj samlandanoj.

La genio de Wyspiański estas plena de tiu tragismo, kiun ne povas kompreni pli vasta rondo da homoj. Oni malmulte komprenis lin dum lia mallonga vivo kaj ne pli multe oni komprenas lin ankaŭ nun post lia plena de tragismo morto. Wyspiański mortis en malsanulejo, ĝis la lasta momento batalante kun materiala mizero, malgraŭ tio, ke tiu ĉi eksterordinara homo kunigis en sia persono du grandegajn talentojn de poeto kaj pentristo.

Se li trovis malmulte da famo en sia propra lando, tute ne estas mirinda, ke por la fremdlandanoj li restis preskaŭ ne konata.

La grandega genio de Wyspiański ĝis hodiaŭ ne estas ankoraŭ sufiĉe analizita. Lia krea talento estas

---

\* ) legu: Stanislaw Wyspianski.



tiel plena de enigmoj, ke oni facile povas kompreni, kial oni nomas lin misteroplena.

Ni diris en la komenco, ke la genio de Wyspiański estas pure originala. Kaj efektive, inter la verkistoj de l' pasinta literaturo kaj de la lasta tempo malfacile estas trovi tute similan al li. La plej multe li alproksimiĝas al Maeterlinck, kies verkojn ankaŭ trapenetas tiu profunda misticismo kaj tragismo, kiuj estas karakterizaj ecoj de l' talento de Wyspiański. Sed parencaj per la tono, ili diferenciĝas per ĝia potenco. Maeterlinck estas kvieta melankoliko; la morto en liaj verkoj aperas senbrue, sur la fingroj, kvazaŭ ombro, lasas impreson de l' reviga malĝojo; ĉe Wyspiański, kiel diras la bonega pola kritikisto W. Feldman, ĝi aperas kvazaŭ „krakado de ostaro kun terura siblo de falĉilo, kun elspiro de tomboj — terura krianta per tondra voĉo.“

La plej karakterizaj ecoj de l' verkoj de Wyspiański — estas potenco kaj grandego, en kiujn vestiĝas ĉiu lia penso kaj ĉiu sento. Legante liajn verkojn, ŝajnas al ni, ke ni vagas en iaj misteroplenaj spacoj; tiu ĉi potenco spiranta el liaj tragedioj trapenetas la leganton per ia malluma misticismo; vi ne trovos en ili tiujn varmajn sunajn brilojn, kiuj kutimis vin ĝojigi dum la legado de aliaj poetoj.

Ĉie vi sentas ian malĝojan potencon, ĉiu sento fariĝas ĉe li grandega dramo de animo. Wyspiański riĉigis la polan literaturon per sufiĉe granda nombro da ĉefverkoj — kaj ĉie tiu sama impresio, tiu sama senespera fatalismo. „La edziĝofesto“, „Legiono“, „Malbeno“, „Liberiĝo“, „Aĥilles“, „Legendo“ estas vico da potencaj, plenaj de vizioj dramoj. Por iomete konatigi la eksterlandon kun la talento de Wyspiański, ni elektus por la traduko unu el liaj malpli konataj verkoj, sed egale belan kiel ĉiuj aliaj liaj verkoj kaj bonege respegulantan la karakteron de lia poezia genio.

La tragedio „Protesilas kaj Laodamia“ estas bazita sur unu el grekaj mitoj. Laodamia, filino de l' reĝo Akastos, estis forrabitita de la heroo Protesilas, kiu mortfalas en la batalo kontraŭ Troja. La amanta kaj sopir-

anta al li edzino sukcesis elpetegi la diojn, kiuj revenigas al ŝi la ombron de Protesilas, kun kiu ŝi poste foriras en la eternecon.

Sur la fono de tiu ĉi plena de melankolia poezio mito Wyspiański kreis korfrapantan potencon tragedion de animo.

La pasia volupto de unu Laodamia donas al la poeto okazon disvolvi grandegan tragedion kun vidaĵoj de sangaj bataloj, fantomoj de Ĥades, Hermes, Haron kun la vico da surdaj kaj fantaziplenaj figuroj aperantaj kvazaŭ elvokitaj per sorĉoj. La sopiron de Laodamia la poeto, personigas en la formo de Enuo kaj Inkubo. Antaŭ la leganto en ĉarmaj pentraĵoj trapasas vico da rememoroj el la infanaj jaroj de Laodamia, pri komunaj momentoj de l' edziĝa dolĉo. La tragedio finiĝas per plena de feruro memmortigo de Laodamia, kiu tiamaniere volas sendisige kunigi sian animon kun la amato. \*)

En tiu ĉi malgranda verko de Wyspiański respegulas klare la tuta karaktero de lia krea talento.

Oni sentas en ĝi la potencon imagon de Wyspiański, kiu la kvietan sopiron de l' heroiro transformis en korfrapantan plenan de tragismo dramon.

Tia estas Wyspiański en ĉiuj siaj verkoj, eĉ en siaj verkoj de pentrarto, kies li estis unu el la plej eminentaj nuntempaj reprezentantoj en Polujo. La pentraĵoj de Wyspiański, estas hodiaŭ larĝe admirataj en la eksterlando.

Kiel en sia poezio, tiel ankaŭ ĉi tie li estas tiu sama artisto de anima tragedio: malvarmo kaj teruro blovas sur la rigardanton, kiam oni admiras liajn ĉefverkojn de pentrarto; grandegoj ideaj kuniĝas ĉi tie konsente kun la grandego de lia fantazio por krei pentraĵojn plenajn de teruro.

Tre interese estas konatiĝi kun la opinio en tiu ĉi direkto de la eksterlanda kritiko.

---

\*) La originalo en granda parto estas skribita verse. La esperanta traduko konservis nur ĝhian ritmon kaj formon, — tiamaniere oni povis pli facile konservi la precizecon de l' originalo.



En la aprila numero de „Mercure de France“ la konata estetikisto William Ritter, svisa naskito, nun loĝanta en Parizo enpresis grandan artikolon pri la pentraĵoj de Wyspiański. Ni citos el ĝi nur kelkajn pli gravajn punktojn, kiuj laŭ nia opinio plej bone karakterizas la talenton de Wyspiański. „Por lin kompreni,“ diras Ritter, „oni devas antaŭ ĉio koni lian privatan vivon, scii pri lia terura ruiniginta lin malsano kaj pri tio, kiel intime estis ligita lia arto kun la mondo malsanuleja. Kaj tiam ĉiu facile komprenos tiun malĝojan animon kaj malsanan flankon de liaj verkoj. Wyspiański ne serĉis ekscentrecon; tia li estis, tia li vivis, tia li kreis“.

Ritter vidas en li plej eminentan nuntempan dekoracian pentriston. Ĉion, kion li volis esprimi, li esprimis noble kaj nekompareble. Liaj tipoj estas ĉe la unua rigardo malbelaj, sed ĉe pli proksima konatiĝo ili ravas per sia potenca impreso. Priparolante fine liajn skizojn dekoraciajn Ritter aldonas: „Genio multe pli perfekta ol ĉiuj, kun kiuj penis lin kompari la kritiko (Hodler, Munch, Gaugin) li fariĝos unu el la plej dolorigaj revaj temoj de l' estontaj generacioj: mortinta en trideknaŭa jaro de sia vivo, de dek jaroj premata de malsano! Kion li povus doni en plena sano, ĝuante vivon senzorgan kaj kvietan? “


Tio sama, kion diris Ritter pri la pentrista arto de Wyspiański povas esti entute ripetita pri liaj poeziaj verkoj, ĉar kiel ni diris supre, la lemoj de tiuj ĉi du specoj de lia genio estis preskaŭ la samaj. Eble en malproksima estonteco la verkoj de Wyspiański transiros en fremdajn literaturojn kaj tiam tiu „nekomprenebla“ de sia propra nacio genio trovos admirantojn en la tuta mondo.

*Tradukinto.*



11  
7  
11  
J  
S  
J  
.





Rossowski

v. II. 52.





492147



Biblioteka Narodowa  
Warszawa



30001005045424